

ILEI anoncas

2021-08-10

Aliĝis al VEKI-2 156 personoj el 42 landoj.

La 54-a ILEI-kongreso, kiu dua-foje okazas virtuale, kaj tial nomiĝas ankaŭ VEKI-2 (Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI) ofertas tre gravajn debatojn, interesajn prelegojn kaj plaĉajn koncertojn. Okaze de la 9-a de aŭgusto, la Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj kaj Lingvoj, okazis granda debato kun pluraj podianoj altnivele kompetentaj pri tiu temo.

Ĉiuj programeroj aperos en la retejo de ILEI ĉe Youtube: Esperanto+Edukado ILEI.

La Komitato de ILEI kunsidis dimanĉe la 8-an kaj marde la 10-an de aŭgusto kadre de la 54-a Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI. La kvorumo estis atingita kaj la Komitato estis decidpova. Okazis aprobo de la jarraporto. Ne povis okazi la voĉdonado pri la financoj. Pro tio okazos plia kunsido sabate la 14-an de aŭgusto. Pro tio la malnova Estraro ne povis esti senŝarĝigita.

Elektio okazis. Elektiĝis kiel prezidanto Ahmad Reza MAMDUHI, kiel sekretario Elena NADIKOVA, kiel kasisto Karine ARAKELJAN. Plie elektiĝis Laura BRAZZABENI, Alessandra MADELLA, Radojica PETROVIC, Fernando PITA kaj Marija JERKOVIC. Do la Ligo havas 8-personan Estraron por la tri sekvaj jaroj.

La Kongreso plu iras per AMO-seminario merkrede kaj universitata simpozio ĵaŭde kaj vendrede.

La prezidinto Mireille Grosjean

La prezidanto Ahmad Reza Mamduhi